August Heinrich Hoffmann,

Abendlied

tradukita de Manfredo Ratislavo

Nun vesper' fariĝas
Ree tie ĉi,
Paco subeniĝas
Kaj ripozas ni.

Rivereto fluas
Ĉe la roko sen
Ĉeso kaj ĝi bruas
Plu kaj plue jen.

Sonoril' neniu
Ripozigas ĝin,
Ne dormigas iu
Ĝin je l' tagofin'.

Tia, mia koro,
Estas ankaŭ vi.
Donu, ho Sinjoro,
Pacon vi al ĝi.

Traduko de la Germana poemo "Abendlied" de August Heinrich Hoffmann *(Hoffmann von Fallersleben, ∗1798-04-02 – †1874-01-19) en Esperanton de* Manfredo Ratislavo *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04) en 2012-11.*

Arg-645-1378 (2012-11-27 18:34:25)

Vidu ankaŭ: `http://de.wikisource.org/wiki/Abendlied_(Fallersleben)`*. La muziknotoj troviĝas en* `http://www.lieder-archiv.de/abend_wird_es_wieder-notenblatt_300026.html`*, la melodio estas aŭdebla en* `http://ingeb.org/Lieder/abendwir.html`*.*